Libro aperinta en granda eldonejo kritikas Esperanton:

Esperanto – malfacila lingvo

Estas konate, ke la esperantistoj interesiĝas pri lingvoj kaj opinias, ke ilia idiomo Esperanto estas la plej bona kaj supera iam ajn ekzistinta kaj, antaŭ ĉio, ke ĝi estas facila aŭ facile lernebla. Sed ekzistas fakuloj, kiuj havas alian opinion, ekzemple Gaston Dorren, nederlanda lingvisto kaj ĵurnalisto, kiu skribis nedikan libron kun la titolo *Lingvoj, pervorta vojaĝo tra Eŭropo*, kiu aperis en sia tria eldono. La libro estis tradukita el la nederlanda al la germana lingvo. La celo de ĝia prezento estas montri kuriozaĵojn kaj trajtojn, kiuj faras la lingvojn de Eŭropo unikaj kaj mirindaj. Nu, temas pri verko popularscienca, kiu mencias faktojn, kiuj estas ĝenerale konataj al tiuj, kiuj okupiĝas pri lingvoj kaj lingvistiko. Sed la historioj, ligitaj kun tiuj lingvoj, kiujn la libro traktas, estas tamen interesaj kaj legindaj. Dorren skribas pri la litova lingvo, kiu plej similas al la hindeŭropa pralingvo, pri la finnugraj lingvoj, ene de kiuj finnoj kaj hungaroj ne povas interkompreniĝi, pri la retoromanĉa, kiu disfalis en multajn diversajn dialektetojn tra diversaj montaraj regionoj, pri la franca, kial ĝi fariĝis tiu lingvo, kiu ĝi estas hodiaŭ. Ktp. Dum sia amuza vojaĝo tra la lingva pejzaĝo de Eŭropo Dorren tuŝas do multajn ekzemplojn kaj kazojn de stranga lingvo – kiel la malta, islanda, vaska, albana kaj jida – aŭ de kurioza lingvosituacio – kiel en Norvegio, Svislando, Belorusio aŭ Monako. Ĉiu lingvo havas sian longan historion kaj prezentas sin hodiaŭ en maniero kaj formo, kiu ofte estas malfacile komprenebla. Ĉiukaze, la plej multaj lingvoj estas malfacilaj kaj komplikaj, havas malregulan gramatikon, malracian alfabeton kaj nepraktikan prononcon, kiel cetere ankaŭ la angla, kiun la aŭtoro taksas unu el la plej absurdaj lingvoj el la vidpunkto de tiuj kriterioj, kvankam ĝi estas konsiderata kiel moderna mondlingvo pro sia laŭdira *aparte nekutima facileco.*

En la lingvokolekto de Dorren ne mankas ankaŭ Esperanto. Sed kiu kredas, ke li laŭdas ĝin pro ĝiaj grandaj lingvaj avantaĝoj, kiuj estas sanktaj kaj netuŝeblaj por ĉiu esperantisto, tiu trompiĝis. Por Dorren Esperanto estas *aparte elstara ekzemplo de malfacila kaj nepraktika lingvo.* Kial?

Estas konate, ke Zamenhof, kiu ne estis profesia lingvisto, kiel Dorren emfazas, trovis la anglan lingvon facile lernebla, sed ial li tamen decidis enkonduki en sian novan artefaritan idiomon diversajn trukojn, kiuj mankas en la angla kaj do esence malfaciligis la lernadon de Esperanto, ekzemple la verbaspektojn de la slavaj lingvoj kaj la sistemon de la kazoj. Nu, la sistemoj de la verbaspektoj kaj kazoj en Esperanto nature ne eestas kompareblaj kun tiu de la slavaj lingvoj, en kiuj ili estas aparte komplikaj. Sed tamen. Laŭ Dorren, ilia enkonduko en Esperanton ne estis necesa. La frazparon *la viro vidas hundon* kaj *la hundo vidas viron* li trovas konfuza kaj malpraktika. Nature, la esperantistoj defendas en tiu konstruo idealan manieron distingi la subjekton de la objekto. Por homoj, kiuj konas la latinan lingvon aŭ parolas slavajn lingvojn, ĉi tiu damna akuzativo ne estas tro ekzota afero, sed por neeŭropanoj ĝi estas tute ne imagebla. La difinita artikolo *la* ĝenas la aŭtoron, ekzemple en la kazo de la vorto *viro*, kio por hispano aŭ italo devas esti absurda, ĉar en iliaj lingvoj la artikolo estas el aŭ il. Ankaŭ la maniero diri *la belaj knabinoj* ne trovis la plaĉon de Dorren, ĉar tiel la bela knabino aspektas kiel viro. Tio ne povas esti bela. Laŭ la scio de Dorren, en neniu eŭropa lingvo oni diras *la belaj knabinoj*. Por esperantistoj neniu problemo – ili amas siajn knabinojn des pli forte. Poste: la verboj. Katastrofo! La komencanto de Esperanto povus kredi, ke Zamenhof trovis taŭgan solvon: en Esperanto la verboj estas regulaj kaj facile lerneblaj, kiel oni asertas. Kiu iom progresis en la lernado de Esperanto, tiu baldaŭ rimarkos, ke Esperanto „pretigis kelkajn aĉajn trukojn“, inter kiuj la participo estas la plej fia. En Esperanto ekzistas aktiva kaj pasiva participoj kaj de ĉiuj ekzistas po tri: *ota, ata, ita, onta, anta, inta,* laŭ la ideo de la aspektoj en la slavaj lingvoj, kiuj apartenas al la plej malfacilaj gramatikeroj por fremdlingvanoj. Fakte, ankaŭ multaj Esperanto-uzantoj regas tiujn verbajn formojn nur kun granda peno. Krom kelkaj aliaj kuriozaĵoj en la verba sistemo, la nederlandano kritikas la fonetikan sistemon de Esperanto: laŭ li, la enkonduko de sonoj kiel *h* kaj *ĥ* estas tute ne akcepteblaj, same la sinsekvo de konsonantoj kiel *str* kaj *kl*, ĉar multaj popoloj ne konas tiujn sonojn. Povraj francoj, turkoj kaj japanoj, kiuj devas lerni tiajn sonojn! Estas vere, ke germanoj, francoj, angloj kaj rusoj, sed ankaŭ hungaroj, danoj, ĉeĥoj kaj hipanoj terure prononcas Esperanton, kaj por azianoj kaj afrikanoj tiu lingvo estas definitive tro malfacile lernebla.

Post tiu litanio de kritiko, la aŭtoro konkludas: „Ho, granda dio, kion Zamenhof pensis, kiam li inventis sian lingvon? Oni demandas sin, kial li ne klopodis por krei facile lerneblan lingvon! Li estus devinta fari sian lingvon senkaza kaj senparticipa, kiel la angla. Li estus povinta rezigni pri adverboj, kiujn la germana lingvo anstataŭigas per adjektivoj, kaj liberigi la alfabeton de malpraktikaj sonoj kaj konsonantaj monstroj, kiujn multaj popoloj ne konas. Ankaŭ verbaj finaĵoj estas superfluaj, kiel montras la ĉina lingvo, same la seksoj, kiuj mankas en la hungara.“

Bonŝance, la kritiko pri la supersignoj forestas.

Sed tutegale, tiuj pekoj kaj eraroj de la lingvo Esperanto ne tro gravas. Dorren estas konvinkita, ke sen propra ŝtato kaj sen potenca ekonomio Esperanto neniam povis havi sukceson. Kaj la mondo, t.e. 1,5 miliardoj da homoj, parolas angle, kiun li, Dorren, trovas ĉiukaze multe pli facila lingvo kompare kun Esperanto, kiun scipovas kaj aplikas maksimume kelkmil homoj, ĉefe en Eŭropo.

Tamen, malgraŭ ĝiaj lingvaj avantaĝoj, Dorren konsideras la anglan maltaŭga kiel mond-lingvon, kaj li pledas por la hispana, kiun li laŭdas, ĉar laŭ li ĝi posedas relative facilan gramatikon, akcepteblan ortografion kaj sufiĉe praktikan prononcon. Efektive, la hispana estas surprize kaj agrable regula kaj tre rapide lernebla lingvo. Krom tio, la hispana lingvo, kiu disponas pri internacia signifo, estas parolata de pli ol 400 milionoj da homoj en 30 landoj.

Ne estas konate, ĉu Dorren scias pli pri Esperanto ol tiuj primitivaj argumentoj, kiujn ripetis ĉiuj supraĵaj kritikistoj kaj malamikoj de tiu internacia planlingvo jam antaŭ li. Pri la historio de la Esperanto-movado, pri kongresoj, Esperanto-literaturo, inter- kaj socilingvistaj aspektoj kaj pri ideoj kaj ideologio, pri milito kaj paco, justeco kaj homaj kaj lingvaj rajtoj oni legas nenion. Eĉ la fakto, ke ekzistas esperantistoj kaj homoj, kiuj parolas Esperanton kaj entuziasme (sed vane) kredas je tiuj valoroj, estas prisilentita. Malgraŭ la duboj de Dorren, Esperanto perfekte funkcias kiel lingvo, kaj multaj homoj eĉ preferas verki en Esperanto anstataŭ en sia (pli malfacila) gepatra lingvo.

La belga lingvofilozofo Philippe van Parijs (kiu cetere absolute estimas Esperanton) instruas, ke la sukceso de iu lingvo dependas precipe de ĝia *lern-motivacio* kaj malpli de la demando, ĉu iu lingvo estas facile lernebla, aŭ ĉu ĝi estas neŭtrala. En la kazo de Esperanto tiu motivacio estas tre malgranda, ĉar ekster la Esperanto-movado tiu „internacia“ lingvo ludas neniun rolon. Do, el la vidpunkto de la lernmotivacio Esperanto estas eble la plej malsukcesa kaj sensignifa lingvo de la mondo. La esperantistoj scias tion, sed ili rifuzas konfesi tiun veron.

Povas esti, ke Gaston Dorren pravas kun sia tuta kritiko, kvankam temas nur pri lia opinio, kiun la esperantistoj strikte kontestas. En principo eblus ignori ĝin, ĉar la praktika uzado de Esperanto montris aliajn rezultojn. Ĉar la libro aperis en granda germana eldonejo, ĝia eldonkvanto havas amasan karakteron kaj ĝi apartenas al malmultaj popularsciencaj verkoj en la nederlanda kaj germana, kiuj iom furoris kaj estas aĉeteblaj en ĉiu librovendejo. Do, probable ĝi estis kaj estos legata de sufiĉe multaj homoj, kiuj ricevos la mesaĝon, ke Esperanto estas *malfacila lingvo.* Vivu la antaŭjuĝoj! Per tio, la 130-jara propaganda strebado de la Esperanto-movado klarigi al la homaro, ke Esperanto estas facila lingvo, estas en principo detruita sur nur kelkaj paĝoj, kiel montras la ekzemplo de la recenzita libro.

Andreas Künzli,
okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo
© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, februaro 2018



Gaston Dorren: Eine verbale Reise durch Europa. Germanigis Juliane Cromme. Ullstein, 3a eldono 2017. 368 p. (Enhavo: https://d-nb.info/1127787586/04)